

La Karavelo

Beletra Esperanto-Revuo pri la Portugallingva Literaturo

*n-ro 013
januaro 2009*

Fondita de João José Santos, en Portugalio, en oktobro 2007



en Evoro, Portugalio, domo de la verkisto

Garcia de Resende
1470 – 1536

⇒ **paĝoj**
21-24

La Karavelo n-ro 013 januaro 2009



- | | | | |
|----|--|--------------------|--|
| 1 | Kovrilo: domo de Garcia de Resende | El la redaktejo | |
| 2 | Enhavo – Kolofono | El la redaktejo | |
| 3 | La UEA-kontoj (ĉefartikolo) | João José Santos | |
| 5 | Fernando Pessoa (poezio):
Mesaô (32-a) | João José Santos | |
| 6 | Skizo pri Historio de Brazila
Arkeologio (historio) | Roberto Ribeiro | |
| 9 | Humberto de Campos (rakonto):
Monstro | Paulo Sérgio Viana | |
| 12 | Tertulianus (religio):
Kristano ne serĉu Sciencon! | Gerrit Berveling | |
| 14 | Poezio:
Min allogas maro portugala
Portugala moro
Velo
Bajkalo kaj Atlantiko | Nikolaj Neĉaev | |
| 15 | Testudo (poezio) | Luiza Carol | |
| 15 | Gervásio Lobato:
Baptopatra nomo (rakonto) | Eduardo Novembro | |
| 18 | Universalaj Kongresoj de Esperanto
(2-a – 1906) (historio) | Djalma Pessata | |
| 21 | Garcia de Resende (historio):
Prologo de l' Ĝenerala Poemaro | João José Santos | |
| 24 | Fotoraporteto:
Evoro, en Portugalio | João José Santos | |

Kiel ni povas plibonigi
La Karavelon
por ke ĝi meritu lokon
sur unu el viaj bretoj?

La Barko: La artikoloj enhavantaj la apudan bildon estas la plej facilaj por komencantoj. Uzu ilin por plibonigi vian lingvonivelon, aŭ tiun de viaj lernantoj. La vortoj de la artikoloj enbarkigitaj nur estos klarigitaj, se ili ne aperos en la Reta Vortaro:
<http://www.reta-vortaro.de/revo/>

Responso: Pri ĉiu artikolo, ties gramatiko, enhavo, stilo kaj vortprovizo responsas la koncerna aŭtoro.

Al blindaj homoj: Kunlaboru bv. por plibonigi la legadon de La Karavelo far blindaj homoj.

Uzado de tekstoj el La Karavelo: Ne uzu tekstojn el la revuo La Karavelo aŭ el alia skribaĵo de LK en alia gazeto, sen antaŭa laŭcela permeso de la LK-direktisto. Havinte permeson por uzi tekston, ĉiam indiku la fonton. Ekz.: «El la revuo "La Karavelo", n-ro 9, junio 2008, paĝoj 5 ĝis 8». Nepre neniu havas la rajton iel modifi la tekstojn, aŭ resumi ilin. La permeso estas nur por revuoj, neniam por libroj aŭ por aliaj publikigaĵoj.

Kolofono

Konstantaj verkistoj...

Djalma Pessata
Eduardo Novembro
Edward Jaśkiewicz
Francisco Wechsler
Geraldo Mattos
Gerrit Berveling
Imre Szabó
Irina Mironova
João José Santos
Leo De Cooman
Luiza Carol
Nikolaj Neĉaev
Paulo Sérgio Viana
Roberto Ribeiro
Roger de Castro Gotardi
Tibor J. Szabadi
Valentin Melnikov

Direktas, redaktas, kompostas

João José Santos

Reviziistoj

Kurt Fischer
Luiza Carol - pri La Barko
Roger de Castro Gotardi
Valentin Melnikov

Telefono (+351) 268 919 000

PoŝTel. (+351) 960 13 15 15

Retadreso lakaravelo@gmail.com

Retejo www.esperantopt.com

Adreso

LA KARAVELO – Dr. João José Santos
Fonte Velha, caixa 3003
7100-078 Estremoz – Portugal

Recenzeblaj libroj

estu sendotaj al la supra adreso.

Reguloj

Pri la principoj, labormaniero kaj reguloj de La Karavelo, nepre elŝutu kaj legu la dosieron **Regularo de La Karavelo**, el la ĉefa paĝo de nia retejo. Ĝi estas konstante aktualigata.


La Katalogo de La Karavelo
estas ĉiam aktualigita en

www.esperantopt.com



La Karavelo

libera softvaro
© João José M. Q. dos Santos



La UEA-kontoj

João José Santos



Kiam mi decidis entrepreni ĉi tiun diversflankan esperanto-laboron, ĉirkaŭ la masto de La Karavelo, mi jam antaŭflaris, ke la du plej grandaj obstakloj al la komercado estos la sendokostoj kaj la bankokostoj.

Fakte, la tro altaj prezoj praktikataj, kaj de la poŝtejo kaj de la banko, altigas la prezojn de la varoj, malhelpante ilian komercadon ĉefe al neeŭropaj landoj. Tamen, tiaj obstakloj ne estas absolutaj kaj, iom post iom, elturniĝema entreprenisto malkovras vojojn por ilin preterpasi.

Rilate al la sendokostoj, eble iam mi aludos al tiu problemo kaj ties solvo. En ĉi tiu ĉefartikolo, mi aludos al la bankokostoj.

LA MALMORALECO DE LA BANKOKOSTOJ

Estas sciite, ke en malmultaj jaroj, la bankoj duobligas siajn riĉaĵojn. Tio bedaŭrinde ne okazas al plejparto de la civitanoj. La disvolviĝo de la aŭtomataj bankosistemoj ŝparigis multan monon al la bankoj, ĉar la civitano pli kaj pli forlasas la uzadon de la bankejoj, por kontroli siajn kontojn en la telebankejoj, kaj en la retbankejoj. Do, tiaj servoj devus esti absolute senpagaj. Tamen, la troambicio transformas homojn en lupojn, kaj jen oniaj bankoj, kiuj devus onin danki tial, ke oni ne ĝenas ilin ĉe la bankejoj, troŝarĝas la klientojn per fi-leĝaj makleraĵoj.

ŜTELSITUACIO

En la spaco de Eŭropunio ekzistas reguloj, kiuj mildigas kaj eĉ nuligas la monĝirajn problemojn. Tamen, la civitano devas konstante atenti por ke sia banko ne turnu la leĝojn por ŝteli lin.

Antaŭ ĉirkaŭ unu jaro, mi ekhavis bankokonton en portugalia banko. Mi elektis tiun bankon, ĉar, laŭ la informoj, ĝi ne

pagigus ĝirmakleraĵojn ene de la lando, se la monĝirado okazas pere de la reto. Jen precize kion mi volis.

En la unua monĝira provo, mi eksciis, ke la sistemo havis ruzaĵon, kiu kontraŭas sin. Mi klarigu: Efektive, la enlandaj monĝiroj, per tiu banko, ne postulas makleraĵon, sed por monĝiri al aliaj eŭropuniaj landoj, la sistemo devigas, ke tio estu farata de entrepreno, ne de simpla civitano. Do, la civitano devas iri al la bankejo por monĝiri, sed en la bankejo la monĝirado postulas makleraĵojn. Laŭ mi, tio estas trompado, friponaĵo.

Kompreneble, mi povus forlasi tiun bankon, kaj solvi la problemon kun alia. Sed mia sperto de portugalia civitano jam instruis al mi, ke mi perdus tempon kaj tempon, kaj alvenus al la konkludo, ke la ŝajne bona banko trovus alian manieron ekspluati min.

Estus bone, ke tiaj situacioj nur okazu en Portugalio, sed bedaŭrinde tiaj kaj aliaj ruzaĵoj estas oftaj en multaj aliaj landoj, eble en ĉiuj landoj. Kompreneble, nepre mi plu devas havi bankokontojn, sed mi havos ĉiujn avantaĝojn uzi ilin kiel eble plej malmulte, kvankam la bankoj sugestas al oni oftege uzi siajn servojn.



"WESTERN UNION"

Intermesaĝante kun alia esperantisto, li proponis al mi: "Kaj kio pri *Western Union*? Oni diris al mi, ke eble la monĝirado estas pli malmultkosta per ĝi." Do, mi informiĝis:

Se mi monĝirus de Portugalio al Brazilo monvaloron inter 1€ kaj 500€, mi devus pagi 4,90€. Tio estas ne tro peza valoro por ĝiri 500€ (malpli ol 1%), sed tro alta valoro por

homo, kiu deziras pagi libron, kiu kostu 15€. Ĝi prezentiĝas eĉ pli multkosta, se tiu homo pagas en realoj, la brazila monunuo, kiu valoras ĉirkaŭ trionon da eŭro. Se al 15€ de la libroprezo, oni aldonus 4,90€ por la monĝiro, plus 6€ por sendokosto, la libro kostus al la brazilano 25,90€, do ĉirkaŭ 78 realoj. Kompreneble, kelkaj brazilanoj povus pagi tion, sed plejparto da ili pagus 15€ por tiu libro, sed ne pagus 25,90€ por ĝi.

LA UEA-KONTOJ

Estas mirinde, kiel ankoraŭ multaj esperantistoj ne uzas kaj ne konas ĉi tiun servon de UEA, kiu povas esti uzata eĉ de esperantisto, kiu ne havu UEA-konton. Mi klarigas:

Supozeble, brazila esperantisto volas aĉeti la du volumojn, kiuj enhavas la 12 numerojn de La Karavelo, de 2007/2008, kiuj kostas 45€. Tiu homo transdonus la monon, en realoj, al la ĉefdelegito de UEA en Brazilo, dirante ke tiu mono devas eniri en la UEA-konton de La Karavelo, kies kodo estas jmqsl. Kaj jen li jam pagis. Poste, la UEA-delegito sendas simplan retmesaĝon al UEA, ordonante la monĝiron el sia UEA-konto al la UEA-konto de La Karavelo. Simpla, senlabora kaj senpaga. Kial multaj esperantistoj ne uzas tiun pagsistemon? Ĉar ili pensas, ke ĝi estas komplika.

LA ONTO: LA ESPO-ENTREPRENOJ

Tiu estis la titolo de la ĉefartikolo de La Karavelo n-ro 5. Ĉi tie, mi reprenas tiun fadenon, por reaserti, ke la estonto de esperanto dependas de **disvastigo**, de **instruado**, de ĝia **uzado**, de ĝia altnivela prilaborado en **literaturo**; sed ke esperanto devas eniri en la socion, en la vivon de la homoj, kaj do **en la entreprenojn**. La aliaj kvar agadkampoj estas la bazo de la pluvivado de esperanto, de la transdono de la verda torĉo de generacio al generacio, sed esperanto nur vaste disvastiĝos tra la socio, kiam ĝi estos uzata en la entreprenoj kaj en la komerco. Kiam ĝi estiĝos monhaviga, tiam la sinjoroj de la mondo apogos esperanton. Ĝis tiam, ĝi estos bela revo, sed nur revo.

Kiam esperanto estos vaste uzata en la komercado, la mezgrandaj entreprenoj daŭre uzos siajn proprajn monĝirajn kanalojn, kaj

eble por tiaj entreprenoj, la UEA-kontoj ne donos specialajn avantaĝojn. Tamen, la civitanoj kaj la entreprenetoj plu bezonas movigi varojn kaj monon tra la landoj. Por tiuj, la UEA-kontoj estas plenefika senpaga sistemo, kiu sternas tiun obstaklon nomitan bankokostojn. Ω




La Karavelo

La LK-Katalogo

disponeblas el

www.esperantopt.com



**TIE, I.A., VI EKKONOS LA KVAR
EBLECOJN LEGI NIAN REVUON**



Mesaço - de Fernando Pesoo

João José Santos tradukis
el la portugala kaj el la latina




*Pax in excelsis.
(Paco en la ĉieloj.)*

TRIA PARTO ¹

LA VUALITO

1. LA SIMBOLOJ

UNUA - DON SEBASTIANO ²



¹ Tria kaj lasta parto de la verko. En la lastaj numeroj, la tradukisto devis bremsi la tradukritmon pro aliaj sen-nombraj esperantaj aktivaĵoj. Ĉiu poemo postulas averaĝe ĉirkaŭ unu labortagon por estiĝi tradukita.

² Por pli da informoj pri Don Sebastiano, legu ĉe La Karavelo:
n-ro 4, sur la paĝo 7;
n-ro 5, sur la paĝo 5;
n-ro 11, sur la paĝo 1;
n-ro 11, sur la paĝo 5.

³ Ĉi tiu sintaksa defio provokanta la miron, kun la majuskligitaj literoj, sonas same strange en la portugala. La spirita dimensio evidentiĝas el ĉi tiuj du strofoj. Ja Don Sebastiano parolas en la unua persono (mi), li mencias sian morton sur la sablo, sed asertas, ke lia revita mi estas tiu, kiu revenos. Klare... ĉu? Kelkaj certe argumentos, ke estante spiritisto la tradukisto, li interpretas la versojn laŭ la doktrino de la reenkarnejo. Fernando Pesoo fakte ne estis spiritisto, sed li estis teozofo kaj astrologo.

Skizo pri Historio de Brazila Arkeologio

Roberto Ribeiro

Unua etapo: Antaŭ-sciencia periodo

Arkeologio en Brazilo ekestis tre frue. En 1843 Pieter Lund, dana geologo, malkovris la unuajn homajn restaĵojn ĉe *Lagoa Santa*, centre de *Minas Gerais*. Ĉar *Lund* estis geologo, kaj tiam la arkeologio apenaŭ ekzistis kiel scienco, liaj observoj sekvis la metodojn de tiu disciplino, kaj do homaj restaĵoj estis rigardataj de li kiel fosilioj, t. e., li ne atentis pri la kulturaj aspektoj de la eltrovaĵoj. Malgraŭ tio, liaj malkovroj estis tre gravaj kaj ili tre helpis malkonstrui la ideon pri biblia diluvo, kiel reala fakto en monda sciencia medio. *Pieter Lund* ankaŭ agnoskis la formaĵojn "sambaquis"^{1 2} kiel homaj konstruaĵoj kaj ne kiel naturaj akcidentoj.

Post *Lund*, dum la dua parto de la 19-a jarcento, kun subteno de la brazila imperiestro Petro La 2-a, kelkaj naturalistoj alvenis al Brazilo por esplori arkeologiaĵojn. En tiu tempo, estis fantaziaj ideoj pri grandaj vojaĝoj de grekoj kaj fenicoj, kiuj estus alvenintaj al la brazilaj plaĝoj en pratempoj. Aperis kelkaj falsaĵoj, kiel la fifama "fenica ŝtono" de Paraibo, sed ankaŭ alvenis seriozaj studentoj, kiel *Von de Steinen*, *Emílio Goeldi* kaj *R. Kröne*. Tiam la evoluciisma skolo estis tre forta en la sciencia medio, kaj la celoj de tiuj homoj estis koni la "evolucian gradon" de la brazilaj indiĝenoj.


Dua etapo: Nescienca periodo

En la unua duono de la 20-a jarcento, preskaŭ ne estis studoj pri brazila arkeologio, kaj ankaŭ pri iu ajn scienco en Brazilo dum la unua respubliko, pro la troa valorigo de retoriko kaj libra scio, rezulto de la estrado

¹ El la tupia "monto de konkoj". Laŭ kelkaj esploristoj, ili estis tombejoj.

² Legu pli ĉe <http://eo.wikipedia.org/wiki/Sambaqui>
En esperanto, oni povas diri: sambakio. (JJS)

Mapo de la studitaj
arkeologiaj lokoj en
Brazilo



de eta burĝaro kaj lokaj diktatoretoj, kiuj prenis la povon tuj post la fino de monarkio. La dua respubliko, la faŝisma Nova Ŝtato, kvankam rigardis arkeologion kiel bonan propagandilon kaj pli-grandigilon de naciisma orgojlo, kompreneble ne favoris la liberpenson.

En tiu periodo, okazis nur esploroj faritaj de nesciencistoj, ĉefe filologoj (en larĝa senco), kiuj klopodis illustri la brazilajn gloriojn per arkeologiaj eltrovaĵoj. Citinda nomo estas *Harold Walter*, angla konsulo en *Minas Gerais*, kaj la kuracisto *Arnoldo Cathoud*. Ambaŭ volis daŭrigi la esplorojn de *Lund* en *Lagoa Santa*. *Walter* ne havis sciencon edukadon, sed li kuniĝis kun brazilaj scivolemuloj kaj formis grupon de amatoraj arkeologoj, la t. n. *Academia de Ciências de Minas Gerais*³, kiu faris ne tro fuŝan laboron, sed kun tre malgranda sciencia valoro. Li ofte estis trompata de lokaj loĝantoj, kiuj vendis al li falsaĵojn.

Guilherme Tiburtius, pomeranlingva⁴ brazilano, laboris en sambakioj de la suda regiono, kaj malgraŭ li estis memlernanto sen ia diplomo, li faris grandajn citindajn eltrovaĵojn, kiuj ankoraŭ estas referencaj.

³ Akademio de Sciencoj de *Minas Gerais*.

⁴ Pomerana germana dialekto. *Tiburtius* parolis kaj verkis en tiu dialekto. Pro tio, dum multa tempo oni ne komprenis lian laboron.

Tria etapo: Franca kaj Usona skoloj

Post la fino de Nova Ŝtato, dum la Popolisma Respubliko, en la 1950-aj jaroj, multaj fremdaj sciencistoj alvenis Brazilon. Kelkaj amatoroj, kiel la dentisto *Josaphat Penna* kaj la studento *M. Rubinger* daŭrigis la studojn, sed kun pli granda scienca bazo ol la antaŭaj.

En 1955, la usona arkeologo *W. Hurt*, el *University of South Dakota*, rekomencis la laborojn en *Lagoa Santa*, kie *Lund* fosis unu jarcenton antaŭe, kaj formis la unuan sciencon arkeologian grupon de Brazilo. En 1962, ekis la tiel nomata franca misio, kiam *Annette Laming-Emperaire* alvenis Brazilon kaj kontaktis kun *J. Penna* kaj *Rubinger*. Ŝi ankoraŭ laboris en *Lagoa Santa*, sed, bedaŭrinde, la fosadoj de *Walter* estis detruintaj la plej gravajn lokojn. En 1964 okazis la puĉo, kiu finis la trian respublikon kaj ekis la milita diktaturo. *Rubinger* estis persekutita kaj mortis. Malgraŭ tio, la laboroj de la franca misio daŭris.

Ĉirkaŭ 1968, Usono kreis programon por fari mapon de pra-historiaj kulturoj en Amerikoj. En Brazilo, tiu programo estis nomita *PRONAPA* (*Programa Nacional de Prospecção Arqueológica*, t.e., Nacia Programo de Arkeologia Esplorado). Pro tio, ke la celo de la programo estis la ellaborado de provizora studo, Usonanoj kreis simpligitan metodon de arkeologia esplorado kaj per ĝi ili trejnigis brazilajn studentojn. La programo estis gvidata de *Betty Meggers* kaj *Clifford Evans*. Kvankam la ideologiaj kaj metodaj limigoj, *PRONAPA* estis grava duflanke: unue, ĝi kreis la unuan sciencon arkeologian metodon instruatan en brazilaj universitatoj; due, ĝi studis multajn regionojn de Brazilo, kie ne estis antaŭaj esploroj.

La anoj de la franca misio fariĝis gravaj studentoj. *André Prous* ligiĝis al *UFMG* (*Universidade Federal de Minas Gerais*, t.e., Federacia Universitato de *Minas Gerais*), kaj daŭrigis la esplorojn en *Lagoa Santa*. *Niéde Guidon* malkrovis la faman lokon *Serra da Capivara*, kaj *Gabriela Martin* ankaŭ faris gravan laboron.

Dum la 1970-aj jaroj, estiĝis teoriaj debatoj inter la franca misio kaj *PRONAPA*. Dum multaj jaroj oni parolis pri du skoloj pri brazila arkeologio: la franca kaj la usona. En tio periodo, ambaŭ skoloj starigis

universitatajn programojn kaj formis la unuan brazilan generacion de arkeologoj.

Kvara etapo: Nuntempa aŭtonoma periodo

En 1980, estis fondita *SAB* (*Sociedade de Arqueologia Brasileira*, t.e., Brazila Arkeologia Societo). Tiam vere estiĝis vera aŭtonoma brazila scienca arkeologio. Universitataj kursoj aperis en Brazilo, kaj novaj metodoj kaj teorioj eniris la brazilan arkeologion.



Surŝtona pentraĵo en *Serra da Lua*.

Unue, la usona skolo plifortiĝis pro irado de brazilanoj al Usono por doktoriĝoj, kvankam kelkaj preferis Eŭropon. Tio devenis el la fakto ke la usona pra-historio estas pli simila al brazila ol la eŭropa. Kiel en Brazilo, antaŭ la alveno de la eŭropanoj, en la 16-a jarcento, en Usono loĝis indiĝenoj, sekve la problemoj estas la samaj: kiel vivis la indiĝenoj antaŭ la alveno de la eŭropanoj, kiel okazis la kontakto inter ili, kaj kiel estiĝis nova societo eŭropida. Male al Eŭropo, en Brazilo ne estis pra-homoj, grekoj, romianoj, ktp.

En la 1990-aj jaroj, oni perceptis, ke rigardo de usonaj arkeologoj ne tute taŭgis al Brazilo. Oni klopodis krei metodojn taŭgajn al la tropikaj medioj kaj adapti teoriojn al la brazila realo.

Nuntempe, oni diskutas la statuson de arkeologoj en Brazilo. Ĝenerale, brazilanoj havas diplomon pri filologio, historio aŭ antropologio kaj faras post-diplomajn studojn en arkeologio. Por labori en ĉi tiu scienco, oni bezonas ankaŭ specialan rajtigilon, donitan de la brazila registaro. Post 2005, oni kreis kelkajn specifajn fakultatajn kursojn pri arkeologio, sed la leĝo ne ŝanĝiĝis.

Konkludo

La brazila arkeologio nur aŭtonomiĝis antaŭ 30 jaroj. Antaŭ tio, la esploroj estis gviditaj de fremdaj sciencistoj. Tio kaŭzis, ke plejparto de la studoj pri la brazila pra-historio estis rigardataj per fremdaj okuloj, kaj interpretataj laŭ fremdaj teorioj. Nur antaŭ 20 jaroj, brazilanoj komencis rigardi sian propran pra-historion per siaj teorioj, cele al respondo de siaj demandoj. Tio okazigis, ekzemple, la aperon de historia arkeologio, t. e., arkeologio pri koloniado kaj nuntempa socio, en la 1990-aj jaroj. Antaŭ tio, Brazilo estis rigardita nur kiel kaprompa peco por solvo de origino de homo en Amerikoj. Vere, eĉ la Eŭropanoj, eĉ la Usonanoj neniam interesiĝis pri la apero de la brazilaj urboj aŭ pri la vivo de la brazilaj sklavo, aŭ pri aliaj aferoj tre gravaj al la brazila kulturo, sed flanka al usona kaj al eŭropa historio.

Bibliografio

CARVALHO, Fernando Lins de, *A pré-história Sergipana*, Aracaju, Universidade Federal de Sergipe, 2003.

PROUS, André, *O Brasil antes dos Brasileiros*, Rio de Janeiro, Jorge Zahar editor, 2006.

BAETA, Alenice, RUBBIOLI, Ezio, *O patrimônio arqueológico da região de Matosinhos*, Conhecer para proteger, Belo Horizonte: ed. dos autores, 2003. Ω




Indiĝeno Vairao (Wairá) de Brazilo.

La Katalogo de La Karavelo

disponeblas el

www.esperantopt.com

TIE, I.A., VI EKKONOS LA KVAR
EBLECOJN LEGI NIAN REVUON





Paulo Sérgio Viana
tradukis el la portugala

Monstro

Humberto de Campos

Laŭ la sanktaj bordoj de Eŭfrato, kiu tiam fluadis sen ŝaŭmo kaj sen ondoj, je la mirinda infanaĝo de la Tero, iradis Doloro kaj Morto. Ili estis du longaj, malprecizaj spiritoj sen difinita formo, kies piedoj ne postlasis spurojn sur la sablo. Eĉ ili mem ne sciis, el kie ili venis. Ili silentis kaj senbrue piediris, rigardante la ĵus kreitajn aĵojn.

Ĉi tio okazis je la sesa tago de Kreado. Kun la muzelo en la rivero, grandegaj hipopotamoj senmove rigardadis sian longan ombron, kiu treme reflektiĝis sur la akvo. Flavruĝaj leonoj, kun tiel grandaj kolhararoj, ke ili ŝajnis strangaj foliaroj de blondaj arboj, levis la rondan kapon, ekzamenante la Dezerton. En la Tero, kie verdaĵo ekkovris la grundon vualante ties nudecon per delikata mantelo el junaj herboj, kiujn unuaj burĝonoj ornamis, boladis ia amaso da novaj estuloj, ankoraŭ timemaj pro la mirakla surprizo de Vivo. Estis gigantaj birdoj, monstrecaj palmopieduloj, kiuj apenaŭ povis stari kun siaj krudaj flugiloj, kaj kiuj havis ankoraŭ ĉe la malfortikaj ostoj la humidecon de koto hieraŭ modlita. Kelkaj el tiuj iradis salte, kun la skeleto videbla, apenaŭ vestitaj per naskiĝanta lanugo. Aliaj jam kuŝis sur sendornaj arbustoj, por la unuaj zorgoj pri la unua nasko. Batrakoj kun verda malseka dorso mute rigardadis, per grandaj, demandaj, fosforeskaj okuloj, la grizan vicon de foraj montoj, kiuj de malproksime aspektis, laŭ ilia virga krudeco, ia silenta, daŭra, senfina procesio de pli grandaj batrakoj. Severaj sovaĝbovoj skuadis la timigan kapon, sur kiu algluiĝis malsekaj, gutantaj faskoj da herboj el la marĉoj, kaj la bestoj bleke defiis sin reciproke, kun la piedegoj en la mola grundo. Kvazaŭ monstra grego de ia giganto, kiu ilin forperdis, elefantoj paŝtiĝadis grupe, kaptante per la



HUMBERTO DE CAMPOS

naskiĝis en la brazila subŝtato *Maranhão*, en 1886, kaj ankoraŭ en adoleska aĝo eklaboris kiel ĵurnalisto. En 1910, li publikigis sian unuan poemaron, kaj tuj poste li translokiĝis al Rio de Ĵaneiro. Li elektiĝis kiel deputito kaj tiam famiĝis kiel aŭtoro de pikantaj, leĝeraj tekstoj, uzante la kaŝnomon Konsilanto XX. Fine de sia vivo, okaze de malsano kaj blindiĝo, li tute ŝanĝis sian stilon – de komika al solidara rilate malriĉulojn. Li okupis seĝon ĉe la Brazila Beletra Akademio.

rosto, kiel verdajn bukedojn, amasojn da freŝaj arbustoj. Jen kaj jen, alko rapide galopis. Kaj je ĝia irado, aliaj bestoj ĝin rigardis, kvazaŭ ili pensus, kia muzelo, kia rostro, aŭ kia beko senfoliigis tiun sekan, pintan branĉon, kiun ĝi forprenis dum sia forkurado. Primitivaj ursoj monotone lekadis siajn piedojn. Kaj kiam pli rapida birdo strekis la aeron per rapida flugo, tiam sidis ia naiva demando ĉe la sensciaj okuloj de ĉiuj bestoj.

Per malgaja paŝado, Doloro kaj Morto iradis, rigardante sen intereso la mirindaĵojn de la Kreitaro. Ili malofte iradas flanke ĉe flanke. Doloro ĉiam iras antaŭe, jen pli malrapide, jen pli rapide; la alia, ĉiam laŭ la sama paŝado, ne antaŭeniras, nek post-

restas. Kiam oni antaŭsentas de malproksime la venadon de la du koboldoj, ĉiuj estuloj skuigas pro agonia teruro. Folioj, ĵus defalintaj sur la grundan ŝlimon, kuntiriĝas de malpreciza ektimo. Bestoj reciproke, malkviete sin rigardas, kaj la vento, eĉ la vento, ŝajnas pli laŭte muĝi kaj pli rapide flui, ĉe la malrapida sed firma alproksimiĝo de la du malamikoj de Vivo.

Subite, kvazaŭ granda nevidebla brako haltigus ĝin, Doloro ekhaltis kaj lasis, ke la kunulo alproksimiĝu.

- Je kia mistero – ĝi diris per surda voĉo – je kia mistero Jehovo, per kaprico de sia plenpovo, ornamis la Teron per tiom da kuriozaj aĵoj?

Morto direktis la observantajn okulojn ĝis la limoj de horizonto, inkluzive de la rivero kaj de la Dezerto, kaj rimarkigis kun rideto elvokanta morton, kiu blekigis la leonojn:

- Eble por ni du...

- Kaj se ni mem farus, per niaj manoj, ian kreitaĵon, kiu estu surtere milda ulo por nia zorgado? Modlita de ni mem, nia ido estus certe malsama ol sovaĝbovoj, ol ursoj, ol mastodontoj, ol fuĝemaj birdoj en la ĉielo kaj ol grandaj balenoj en maro. Ni portus ĝin, vi kaj mi, en niaj brakoj, kaj ni farus el ĝia kanto, aŭ el ĝia bleko, muzikon por nia plezuro... Mi portus ĝin ĉiam kun mi, lule, vivigante ĝian spiriton, perfektigante ĝian animon, formante ĝian koron. Kiam mi laciĝos, tiam vi prenos ĝin al via brusto... Ĉu vi emas?

Morto konsentis, kaj ambaŭ malsupreniris al la riverbordo, kie ili ekkaŭris, seriozaj, modlante sian idon.

- Mi liveros akvon... – diris Doloro, metante la konkavigitan manon, kun skeletecaj fingroj, en la malrapide fluantan akvan etendaĵon.


- Mi liveros koton... – aldonis Morto, plenigante la manojn per putra koto, kiun la suno malmoligis.

Kaj ili laboradis. La seka, kruda koto dissolviĝis en la manoj de la sinistra modlisto, kiu tial senrezulte laboris.

- Alportu pli da akvo! – ĝi petis.

Doloro plenigis la manojn en la rivero, malsekigis la koton, kaj ĉi tiu tuj formiĝis, malhela, laŭ la movoj de la malgrasaj fingroj,

kiuj ĝin premis. Kranio, okuloj, nazo, buŝo, brakoj, ventro, kruroj, ĉio formiĝis iom post iom, laŭ pli aŭ malpli forta maniero de la silentema skulptisto.



- Pli da akvo! – ĝi petis, kiam la koto fariĝis pli rezista.

Kaj Doloro plenigis la manojn en la akvoŭfluaĵo kaj alportis ĝin al la kunulo.

Post kelke da horoj, la Kreitaro enhavis nekonatan beston. Plagate de la dia kreo, la nova enloĝanto sur la Tero ne aspektis kiel la aliaj, kvankam ĝi estis, laŭ siaj detaloj, iel simila al ĉiuj. La hararo estis kiel tiu de leono; ĝiaj dentoj, kiel tiuj de lupo; ĝiaj okuloj, kiel tiuj de hieno; ĝi iradis sur du piedoj, kiel birdoj, kaj grimpis rapide, kiel simioj.

Ĝia apero meze de la bestaro mirigis la Kreitaron. La uroj, kiuj neniam antaŭe sin montris ferocaj, laŭte blekis, kaj skrapis la grundon, ĉe ĝia alveno. Birdoj pepis en nestoj, timigitaj, kaj leonoj, hienoj, tigroj, lupoj rekonis sin je ĝia figuro, minace montris la dentojn aŭ la ungegojn, kvazaŭ la Teron ĵus invadis, tiumomente, neatendata malamiko.

Forigite de la aliaj estuloj, tiel iradis la



Homo laŭ la bordo de la rivero, akompane de Doloro kaj de Morto. En ĝia nefirma spirito foje aperis malkvietigaj demandoj. Certe, se tiuj estuloj timegis je ĝia alproksimiĝo, tion kaŭzis la fakto, ke ili unuanime rekonas ĝian superecon. Kaj tiel pensante, ĝi trovis plezuron en timigado al la birdoj, en persekutado tra la kamparo, aŭ laŭ la bordo de la rivero, al cervoj, al porkoj, al kaproj, al bestoj, kiuj ŝajnis al ĝi malpli fortikaj, momente forgesante Doloron kaj Morton.

Tamen, unu tagon, fieraj pro sia ido, la du malakordiĝis kaj kverelis pri la graveco de ĉiu en la kreado de la aĉeraĵo.

- Mi kreis ĝin! – diris Morto. – Mi liveris koton!

- Ja mi! – kriis la alia. – Kion vi farus sen la akvo, kiu moligis la koton?

Kaj ĉar neniam konsenta voĉo ilin serenigis,

tial ili ambaŭ decidis, ke ĉiu forprenos de la kreito tiun parton, kiun ĝi liveris.

- Mi liveris akvon! – ripetis Doloro.

- Mi liveris koton! – insistis Morto.

Malferminte la brakojn, Doloro sin ĵetis al la monstro, premis ĝin fortege, per siaj manegoj. La akvo, kiun la korpo enhavis, subite supreniris al la okuloj de la Homo, kaj ekfalas, guto post guto... Kiam jam ne estis premebla akvo, Doloro foriris. Tiam, Morto alproksimiĝis al la kotamaso, prenis ĝin en la brakojn kaj foriris... Ω

www.esperantopt.com



Gerrit Berveling
tradukis el la latina

Kristano ne serĉu Sciencon! ¹

Tertuliano ²

En sia De Praescriptione Haereticorum (Kiel Leĝe Bari Herezulojn), Tertuliano unue konstatas, ke ja ekzistas herezoj inter la kristanoj. Tio ne estu miriga, ĉar jam la apostolo Paŭlo tion antaŭvidis: 1 Kor 11:19: "Necese estas, ke ankaŭ herezoj estu inter vi, por ke la aprobitoj evidentiĝu inter vi." Unu el la ĉefaj fontoj de herezo, laŭ Tertuliano, estas la filozofio; en tio li estas plej dogmeme senkompromisa: parolante pri Paŭlo, i.a. li diras:

el Kiel Leĝe Bari Herezulojn:

7:8 Li³ estis en Ateno kaj en personaj kontaktoj li ekkonis tiun homan saĝon, kiu atakas kaj ŝanĝas la veron, kiu ankaŭ mem multoble diseriĝas en siajn proprajn herezaĵojn reciproke inter si batalantajn. 9 Sed kiom rilatas Ateno al Jerusalemo? Kiom la Akademio⁴ al la Eklezio? Kiom herezuloj al kristanoj? 10 Nia organizo devenas de la kolonaro de Salomono⁵, kiu ja mem diris al ni, ke la Sinjoro estas serĉenda en simpleco de l' koro. 11 Mem zorgu vi, kiuj inventas Stoikan aŭ Platonan aŭ Dialektikan Kristanisman! 12 Ni ne bezonas sci-avidon post Kristo Jesuo, - nek studadon post la evangelio! 13 Ĉar ni kredas, nenion ni plu deziras por kredi. Ĉar tion ni ja ekkredis unuavice: ke ne estas, kion plu ni devus kredi...



Poste Tertuliano traktas la frazeron, kiun kaj t.n. ortodoksaj kristanoj kaj t.n. herezuloj ĉiam citadis por pravigi siajn pluajn rezonadojn kaj debatojn: "Serĉu kaj vi trovos" (Mat 7:7). Li kontrastigas tiun frazon kun Luk 16:29: "Ili havas Moseon kaj la profetojn: ili aŭskultu tiujn." - Do fakte, ne necesas debatoj nek diskutoj, ĉar tio, kion ni devas kredi, ja jam estas fiksita. Post tio li donas la jenan vortigon de tio, kion li konsideras ortodoksa Kristanismo (kaj

¹ En Esperanto aperis i.a. de tiu ĉi ege influa Latina kristana aŭtoro miatraduke: *Apologio*, VoKo 1982, 116 p. Liaj tezoj ofte al nunaj kristanoj ne estas popularaj.

² Kvinto Septimio Florencio Tertuliano, ĉ. 155 - post 220.

³ Paŭlo.

⁴ T.e. Platono.

⁵ T.e. el la templo de Jerusalemo, kiun ĉirkaŭas kolonaro.

efektive tio estas unu el la tre fruaj Kredkonfesoĵoj, el kiuj post longaj debatoj estiĝos la fame konataj Kredkonfesoĵoj de la grandaj Koncilioj de Niceo kaj Konstantinopolo):

13:1 Sed la regulo de la fido, por jam dekomence konfesi klare, kion ni defendas, estas kompreneble la jena, laŭ kiu estas kredate, 2 ke Estas absolute nur unu Dio, neniu alia ol la Kreinto de la mondo, kiu estigis la universon per sia parolo, kiun plej unue Li elsendis. 3 Tiu parolo, ankaŭ nomata lia filo, en la nomo de Dio diversforme vidiĝis de la patriarĥoj⁶, ĉiam aŭdiĝis en la profetoj, fine descendis el la



spirito de Dio la Patro, kaj el lia forto, en virgulinon Maria, fariĝis karno en ŝia ventro, naskiĝis el ŝi kaj vivis kiel Jesuo Kristo. 4 Tiam li predikis novan leĝon kaj novan promeson de l' Regno de la Ĉielo, faris miraklojn, estis krucumita, resurektis triatage, estis levita ĉielen, kaj eksidis dekstre de la Patro. 5 Li sendis la reprezentan forton de sankta spirito, por konduki la kredantojn; li estas venonta kun gloro por kunpreni kun si la sanktulojn al la <ĝuo de> la frukto de eterna vivo kaj ĉielaj promesoj kaj por juĝi la profanulojn en daŭra fajro, post restarigo de ambaŭ grupoj, kun redono de ilia korpa karno. 6 Tiu ĉi regulo, kiun - kiel ni akceptas - fiksas Kristo mem, ĉe ni neniel estas pridubata krom per la demandoj, kiujn levas la herezoj kaj kiuj kreas herezulojn.

Kun la protesto ke "Ja la herezuloj apelas je la Skriboj por pruvi sian pravon", Tertuliano nun venas al sia ĉefa temo: li volas montri, ke fakte jure la herezuloj eĉ entute ne rajtas citi la Skribojn, ĉar la Biblio ne apartenas al ili (se diri moderne: ĉar ili ne posedas ties aŭtorrajtojn). Jam unuavice: ili ne akceptas ĉiujn Skribojn de la Biblio, aŭ se ili akceptas, do ne senmanke, ekzemple forigante certajn detalojn/partojn. La plej granda problemo tiutere estis la tezo, ke en la Biblio fundamente ne temus pri Unu Sola Dio, sed fakte, kvankam la plimulto de la legantoj tion eble ne rimarkus, temus pri Du Malsamaj Dioj: la Dio kiu estas la Kreinto de ĉio, t.e. la Demiurgo por uzi la filozofian terminon kiun oni depruntis el Platono, kaj la Dio kiu estas la Patro de Jesuo.

Precipe la gnostika teologo Marciono (Marcion) famiĝis kun tiu doktrino. Se elpensi tion en ĝiaj konsekvencoj, tio kondukus al ekstrema kontraŭjudismo. Sed por tieepokaj kristanoj tiu ĉi konsidero tre malofte estus interesa. La Greklingva teologo Origeno jam plej akre kontraŭis la disigon principan inter Dio-Kreinto unuflanke kaj Dio-Patro aliflanke, kvazaŭ temus Du Diojn. Tiaspeca teologio efektive detranĉus Kristanisman komplete de ĝiaj radikoj. Marcionon oni kondamnis kiel herezulon. La ortodoksa doktrino kristana estu: 'Ekzistas nur Unu Sola Dio, kiu inspiris same la Oldan kiel ankaŭ la Novan Testamentojn.' ⁷ Ω

www.esperantopt.com

⁶ T.e. Abraham, Isaak kaj Jakob.

⁷ En Antologio Latina volumo 5, el kiu devenas tiu ĉi fragmento, devas ankoraŭ sekvi pluraj citoj el *De praescriptione haereticorum*.

**Nikolaj Nečaev****Min allogas maro portugala**

Min allogas maro portugala
 Foro atlantika fluparola,
 Mararomo alga joda sala,
 Bano en laguno, sablo mola.

Portugala moro

Min mirigas portugala moro
 Vivi ĉe la blua flua maro,
 Kuri vele al brazila foro,
 Ĝui sonon dolĉan de gitaro.



Lago De L' Sep Urboj – Asoro, Portugalio.

Velo

Boaton pelas velo
 Al horizonta limo,
 Al poezia belo
 Kondukas verson rimo.


Mi hisas silkan velon
 De mia fantazio
 Por trovi la fabelon
 En lando Poezio.

**Bajkalo kaj Atlantiko**

Nun ripozas en dormeto
 Mar' amata de l' revanto.
 Per glacia blankkvieto
 Kateniĝas mara kanto.

Atlantiko plu aktivas:
 Lude, onde, tajde vivas,
 Ĝi alterne ŝtormas, pacas,
 Jen kvietas, jen minacas.

Ω

**Luiza Carol****Testudo**

Mi portis mian domon ĉien.
Ĝi kreskis pli kaj pli,
samkiel mi.

Nun mi estas mia propra domo.

Iam en la estonteco,
ni apartiĝos:
sendoma mi forpasos;
mia domo plu vivos
senanima. Ω



Eduardo Novembro
tradukis el la portugala

Baptopatra nomo
(adapto el la originaĵo)

Gervásio Lobato
(1850-1895)

Alvenis la baptotago!

Frumatene, tre frue, sinjorino Jozefino ellitiĝis kaj iris al la kuirejo. Pro tio ke la subtila lumo de tagiĝo, filtrita tra la mallarĝa fenestro, ne estis sufiĉe hela, ŝi estis devigata ekbruligi petrolampon por plenumi siajn lavadojn.

Anĝeliko, ankoraŭ ĝuanta sian dormon, vekigis pro la bruo farita de ŝia bofratino, kiu sin plaŭdis per varmeta akvo, kiun ŝi disverŝis surplanken. Momente ektimigita, ŝi restis atenteme provante malkovri la devenon de tiu konfuzego ŝin vekinta.

— Sendube jen iu ajn tie ene.

Tiam vere netrankvila, tremanta pro timo kaj malvarmo, ŝi noktoveste elsaltis el la lito, kaj skuis sian edzon.

— Kio?... Kio okazis? — grumblis Justino, kun la okuloj duonfermitaj, sin turnante sur la lito.

— Iu ajn moviĝas tie ene. — flustris Anĝeliko, ektimigita.

— Ba! Certe estas musoj!... Dormu, dormu... — kaj sin turnis aliflanken albrustigante la litaĵojn.

— Kiaj musoj, viro! Moviĝu... Dio! Kia molaĉa viro!... Ĉu vi ne aŭdas?...

Tiun saman momenton, kiam Jozefino lavis la kolon, ŝi faligis la akvumilon kuŝintan sur la kuireja benko.

— Ja, vere! — diris Justino, jam ankaŭ ektimigita, sidigante sin surliten. — Mi jam scias, kio estas... Jen ŝtelistoj!

Kiam kliniĝis por levpreni la akvumilon, la fruiĝintino ternis, pro trabloveto.

— Malvarmumitaj ŝtelistoj! — aldonis Justino — Atentu ĉu la pordo de nia ĉambro estas bone ŝlosita...

— Sed iru tien enen por vidi tion, kio okazas.

— Nenio, nenio... Metu la seĝojn kontraŭ la

pordo por ke ili ne perforte eniru... Kaj ekkriu!

— Ĉu vi freneziĝis, edzo? Ĉu vi volas kaŭzi skandalon en la strato?

— Mi ne kulpas! Jen bone... Ĉu ni devos lasi nin forrabi por eviti skandalon?

Eksaltinte ellite, kaj ekkriante, li frapis sur la kontraŭan muron, tiu al la apuda ĉambro apartenanta al Jozefino, lia fratino.

— Franjo! Ho, franjo! Vekiĝu kaj kriu helpon! Kriu helpon!

Tiam, ne estanta tie, ŝi ne povis aŭdi sian fraton, kiu susuris kun timoplena voĉo.

Ne ricevinte respondon, li pli kaj pli altigis sian voĉon, tiom ke lia fratino finfine, envolviĝinta per bantuko, alkuris al la koridoro por demandi:

— Kio okazas, fraĉjo, ĉu vi volas ion?...

— Estas ŝtelistoj tie ene, kriu helpon!...

— Ne estas ŝtelistoj! — ride ŝi respondis.
— Estis mi, kiu min lavis.

Trankviligita, Justino sin turnis al la edzino kaj fulmkolere rigardis ŝin:

— Vi, malsaĝulino! Min ĝeni je tia horo pro viaj timoj! Vi ŝajnas infano, ĉion timanta. Veki min je mia plej bona dormado! Ŝtelistoj... ho, kia ideo! Nur el sencerba kapo, kiel la via...

Li reenlitiĝis grumblante, dum la edzino sin vestante lin insultis «ke li estis ankoraŭ pli timema ol ŝi, viro je tia aĝo, kiu povus esti ŝia avo». Sed tuj ŝi ŝanĝis la temon, kaj alitone:

— Hodiaŭ, multon farendan ni havas. Iel ajn mi leviĝas tuj!... Post nelonge jen la invititaro alvenonta, la loĝejo antaŭe aranĝenda. Helluma jam estas la tago... Kaj ankaŭ vi devos ellitiĝi por vin razi, iri ĉe nia baptano por ekscii kiun nomon oni donos al la infano, kaj poste tuj ek al la preĝejo...

Justino lasis ŝin paroli, envolvis sin en la littukojn kaj en silenton, tute dormema.

Malmulte daŭris, tamen, tiu dormo; lia edzino, tuj post sin vesti, dismalfermis la ĉambran fenestron, kaj tiam la tago enpenetris, malpermesante lin plu ĝui la matenan pigrecon.

Ankaŭ li vestiĝis kaj iris al la manĝo-ĉambro por tie sin razi, dum Ameljo balais

ĉiujn dompartojn pro sia fiksideo pri purigado. Sinjorino Jozefino, vestita per subjupo kaj negliĝo, sapumis la etan Erneston, tre ploremaĉa kaj sendisciplina, spite de la streboj de lia patrino por allogi lin al la ĝuota festeno, kaj lasi la onklinon lavi lian vizaĝon kaj ŝmiri hararpomadon.

Ĉio haste moviĝadis.

Justino, en ĉemizmanikoj kaj pantofloj, portis la ankoraŭ novbrilan pantalonon de sia edziĝo. Anĝeliko restis kun subvestoj kovritaj de malnova nigroblanka ŝalo punktita de makuloj. Jozefino havis gladigitajn harfaskojn, tre bonodorantaj rozesencon. Ernesteto portis bluan antaŭveston, lia vizaĝo ruĝiĝis pro la sapumado, kaj la grastrepita hararo, kvankam kombita, pendis sur la frunto. Kun la buterŝmiritaj manoj alkroĉitaj al la patrino jupo, li daŭre ploraĉis kaj kriegis: «mi malsatas!...».

* * *

Surmetinte la veston rezervitan por grandaj ceremonioj, Justino alĝustigis sian blankan kravaton, sur ĉio tio la ĉiutagan redingoton, kaj eliris por frapi ĉe la fronta pordo, tiu de la konsiliano.

Oni enirigis lin en malgrandan tapiŝitan atendejon dekoraciitan de flavetaj kurtenoj kaj pezaltaj seĝoj. Elstaris granda spegulo super bukedo de ĉiuformaj kaj ĉiukoloraj bizaraj floroj inter du vastegaj strutovoj, kiujn la konsiliano Torres estis kunportinta okaze de sia vojaĝo kiam subleŭtenanto — kariero de li forlasita pro la marmalsano —, kaj kiu donis al li pretekston por prelegi pri moroj kaj uzaĵoj de tiuj unikaj birdoj.

Timeme, Justino sidiĝis kaj ekpensis kiamaniere li povus ekscii pri la konsiliana nomo, ne montrante sian nescion pri tio, ĉar siaopinie tio estus manko de respekto al tiom grava persono. Post iom longa atendado aperis la konsiliano surmetanta grenatkoloran negliĝon kaj flavan kapveston kun pendanta bulkvasto.

— Bonegan tagon! Ĉu vi ĉi tie? Ĉu ne estas hodiaŭ la grava tago? Ankoraŭ frue, ĉu ne? Ĉu ja estos je tagmezo? Bone estos, ke tio ne tro malfruiĝu, ĉar en tiaj ceremonioj oni ŝatas akuratecon.

Justino volis kapti la okazon de la

interparolado por malfermi vojon al sia demando:

— Jen kial mi ĝenas vian eksceleton, por eviti ian malfruiĝon.

— Ba! Miaflanke restu senzorga. Mi scias plenumi miajn devojn. — replikis iom akre la konsiliano. — Do, kio venigis vin ĉe mi?

— Ĝuste, mi volas skribi la registron antaŭ la ceremonio por ĝin mallongigi, kaj vin peti permeson por ke via baptofilo ricevu vian nomon.

— Mian nomon?... Jes ja... vi povas... Mi ne kontraŭstaras...

— Treege danke!...

Enirinte en sian skriboĉambron, tuj poste la konsiliano revenis kaj transdonis papereton al Justino:

— Jen ĉiuj bezonataj informoj; tie ankaŭ la nomoj de miaj gepatroj. Nur la mian mi ne metis, ĉar vi ĝin jam bone konas, ĉu ne?

— Ha! Per... perfekte... — balbutis Justino.

— Ho, mi forgesis... vi bonvolu aldoni, ke mi estas 48-jara kaj vidvo... Ĝis poste, je tagmezo akurate! — li forpermesis la alian.

Senkuraĝigita, Justino reiris hejmen, kie la edzino lin atendis:

— Nu, rapidiĝu al la preĝejo, jam estas preskaŭ la deka...

— Bone dirite, sed kiun nomon oni donos al nia filo?

— Ĉu vi ne... ?

— Ne... !

— Stultulo! Tiam vi ankoraŭ ne scias, kiun nomon doni al la infano?...

Sed li, ekscitite:

— Ha! Jen trovita! Ni demandos ĉe la suba spicejo, kie ankaŭ ili faras siajn aĉetadojn...

— Jes ja, Bona ideo! Iru tuj!

Kure malsuprenirante la ŝtuparon, li eniris la vendejon:

— Bonan tagon, najbaro. Ĉu vi povus informi min pri la unua nomo de la konsiliano?

— Momenton... — li serĉis en sia vendo-listo. — Jen... Moseo... Li estas Moseo Torres!

— Dankege! — kaj Justino ekiris tuj al la preĝejo.

* * *



— Mi neniam toleras insultojn de iu ajn! — aŭdiĝis la voĉo de la konsiliano.

— Ĉu vi nomas min Judaso, mia baptano? — ĉagrenplene balbutis Justino.

La prioro stariĝis klopodante kvietigi tiun tempeston:

— Estas nenio, sinjoroj, nur miskompreno...

— Ĉu nenio? Ba! Vi ŝercas, ĉu? Ho, nenio! — kriadis la baptopatro.

— Sed... kio okazis paĉjo? — demandis la fraŭlina kvaropo Torres.

— Ĉi tiu sinjoro invitis min, kiel baptopatron de lia filo, devigis min fari elspezojn... ĝeniĝi... kaj fine insultis min!

— Mi petas de vi pardonon, mia baptano...

— Nu, malbone... malbone!... mi jam diris! Mi ne plu permesas ke vi min nomu baptano!... Inter ni ne plu io ajn komuna!...

— Eĉ nek mia filo, sinjoro konsiliano? — emociigita plendis Justino.

— Sed kio okazis? — ĥora demando de la virinoj.

— Ĉi tiu sinjoro aŭdacis moknومي min Moseo. — finfine klarigis la ĉagreniĝinto.

— Sed sinjoro konsiliano, Moseo estis kardinalo-patriarko! — rimarkis la pastro.

— Jen veraĵo! — apogis Justino. — Moseo estis kardinalo-patriarko...

— Sed kio malbona estas pri tiu nomo? — demandis la pastro.

Sabino, milde rigardante per siaj grandaj malhelaj okuloj, klarigis:

— Jen!... Kiam mia patro deĵoris en la mararmeo, li akcidente defalis de boato, sed oni sukcesis tuj savi lin de enakviĝo, kaj pro tio oni moknomis lin Moseo, kion li tute neniam ŝatis. Jen!... ☹



Djalma Pessata

UNIVERSALAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

1906

2-a Universala Kongreso de Esperanto



Loko: Ĝenevo, Svislando

Dato: 28-a de aŭgusto ĝis 2-a de septembro

Aliĝintoj: 818

Dum la Dua Universala Kongreso estis formata **Konstanta Komitato de la Kongreso (KKK)**, kiu konsistis el **Internacia Organiza Komitato (OK)**, elektita de ĉiu kongreso por prepari la sekvan; el **Loka Komitato**, kies tasko estis helpi al ĝi por difinitaj lokaj taskoj; kaj el **Konstanta Ĝenerala Sekretariejo de la Kongresoj**, je dispono de la Internacia Organiza Komitato.



Jen unu el la plej belaj el ĉiuj kongresejoj, la **Wilson-Palaco**, en Ĝenevo, Svislando, kie okazis la 2-a UK. Sube, propaganda poŝtkarto pri la 2-a UK. En ĝi, kongresanoj malakceptas la helpon de tradukisto, ĉar ili ja parolas Esperanton.



www.esperantopt.com

KURIOZAĴOJ PRI LA 2-A UK


- En 1906 Zamenhof jam montris sin konscia pri la misio de Esperanto rilate al mondaj konfliktoj. En sia parolado dum la 2-a UK li diris: "Nun, kiam en diversaj lokoj de la mondo la batalado inter la gentoj fariĝis tiel kruela, ni, esperantistoj, devas labori pli energie ol iam".
- En tiu kongreso estis incidento kun hispana militisto, ĉar li prezentiĝis nome de la kataluna nacio, aŭtonoma regiono de Hispanio.
- Edmond Privat estis nur 16-jaraĝa, kiam li partoprenis en la 1-a UK. En la sekva jaro, li jam estis la ĉefa organizinto de la 2-a UK.
- Dum la 2-a UK, okazis ŝipa promenado sur la urba lago Lemano. Dum la promenado, kiam oni demandis pri la opinio de Kazimierz Bein (KaBe) pri la baldaŭa venko de Esperanto, li respondis: "Unue la esperantistoj devas lerni Esperanton".
- La unua glumarko kun dato aperis en 1906 por la 2-a UK.
- En 1906 aperis la broŝuro "La Homaranismo", de Ludoviko Zamenhof.
- La eminenta lingvisto Ferdinand de Saussure (foto apude) ne partoprenis la duan UK-on en Ĝenevo pro la timo iel kompromiti sian pozicion kaj famon de lingvisto, kvankam li havis simpatian rilate Esperanton.



TEATRAĴOJ PREZENTITAJ EN LA 2-A UK



- *La letero de rekomendo* - de Max Maurey, kun la partopreno de Leono Zamenhof (foto maldekstre), frato de Ludoviko Zamenhof;
- *La floro de l' pasinto* - de Edmondo de Amicis, kun Edmond Privat (foto dekstre) kaj Rosa Junck;
- *Agrabla surprizo* - de Wilhelm Frerking;
- *Pipamanto* kaj *Senhejmulo* - de Federico Pujula y Vallés.



INTERNACIA RUĜA KRUCO EN ĜENEVO



La esperantista kongreso de Ĝenevo (1906) unuanime akceptis la sekvantan deziresprimon, kiun publikigis la Internacia Bulteno de la Societoj de la Ruĝa Kruco en 1906:

"La esperantistoj, kunvenintaj en kongreso en Ĝenevo, konsiderante ke ĉiu malsanulo aŭ vundito de batalejo, kia ajn estas lia nacieco, rajtas la flegadon de la ambulancoj, de la kamparaj hospitaloj kaj de ĉiu establaĵo sur kiu floras la flageto de la Ruĝa Kruco (...) esprimis la deziron, ke la internacia helplingvo Esperanto estu konata, se ne de ĉiuj, almenaŭ de la plejmulto el la personoj alvokataj fari aŭ ricevi flegadon de la Societoj de la Ruĝa


Kruco. Por atingi tiun celon, estos necese:

1-e ke la anglaj esperantistoj uzu sian tutan influon apud la Organiza Komitato de la venonta Internacia Konferenco de la Ruĝa Kruco por ke la demando pri la lingvo Esperanto estu enmetita en la programon de la pridiskutotaj demandoj dum unu el la seancoj;

2-e ke unu aŭ pluraj esperantistoj de ĉiu nacio prezentu kaj subtenu, aŭ prezentigu aŭ subtenu tiun demandon al la Konferenco de Londono;

3-e ke la propagando estu plej aktiva en la societoj de sekurado al la vunditoj kaj ke la esperantistoj de ĉiu nacio, membroj de la Ruĝa Kruco, kuracistoj, ĥirurgoj, farmaciistoj, ĉiugradaj militistoj, laŭeble plej bone strebu por organizi prelegojn pri kaj kursoj de Esperanto."

PAPO PIO LA 10-A BENAS LA 2-AN UK-ON




La Papo Pio La 10-a (foto dekstre) estis la unua papo, kiu aŭdiencie akceptis esperantistojn. Tiu aŭdienco okazis en junio 1906. La esperantistoj prezentis al li jarkolekton de la revuo "Espero Katolika". En la frontpaĝo de la unua eldono, Pio La 10-a legis laŭtvoĉe poemon de la litova pastro kaj poeto Aleksandro Dombrovski, dirante ke li komprenis ĉion. La Papo fariĝis entuziasma pri Esperanto kaj sendis al la redaktoro de la revuo "Espero Katolika", Émile Peltier (foto maldekstre), benon, kiu estis anoncita dum la 2-a Universala Kongreso de



Esperanto, en Ĝenevo, en la jaro 1906, meze de tondraj aplaŭdoj, ankaŭ de protestantoj kaj eĉ de liber-pensuloj.

EMINENTA BRAZILANO EN LA 2-A UK



José Joaquim de Campos da Costa Medeiros e Albuquerque (1867-1934) estis eminenta brazila ĵurnalisto, profesoro, politikisto, poeto, teatra verkisto, rakontisto, romanisto, oratoro, eseisto kaj memor-verkisto. Li verkis la himnon "Himno al la Proklamado de la Respubliko" kaj estas la fondinto de la Seĝo 22 de la Brazila Beletristika Akademio. Li ankaŭ laboris, por ke la brazila registaro deklaru Esperanton "klara lingvo por telegrafo".

Li ne nur estis fervora propagandisto de Esperanto, sed dum certa tempo eĉ partoprenis en la movado. En 1906 li partoprenis en la 2-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Ĝenevo, kaj en 1907 li fariĝis prezidanto de la Brazila Klubo de Esperanto.

LA NEŬTRALECO DE LA KONGRESOJ DE ESPERANTO

En 1906, la Lingva Komitato, kies prezidanto estis Sven Krikortz (foto dekstre), fondis la Konstantan Kongresan Komitaton, kiu aprobis la Deklaracion pri la Neŭtraleco de la Kongresoj.

El tiu deklaro, sennaciistoj zorge notis la agnoskon, "ke la ĝenerala alprenado de helpa lingvo internacia havas, eble post longa tempo, gravajn kaj tre fruktoportajn konsekvencojn por la vivo de la popoloj, en la politika, religia kaj sociala kampoj". Ω





La Ĝenerala Poemaro de Garcia de Resende (1470? – 1536)



João José Santos

verkis la tekstojn
tradukis el la mezepoka portugala

ĜENERALA POEMARO

La *Ĝenerala Poemaro*, de Garsio Rezendo¹, publikita de la aŭtoro en 1516, arigas la plej grandan parton de la portugallingvaj poemoj verkitaj inter la fino de la Mezepoko kaj la komenco de la portugalia Renesanco². En ĝi brilas preskaŭ 300 poetoj kaj floras ĉirkaŭ 1,000 poemoj. Garsio Rezendo mem tie publikis siajn famajn strofojn honore al la morto de Don Ineso Kastro³.

Multaj el tiuj poemoj estas verkitaj en la kastilia, kaj multaj en la portugala. Fakte la portugalia kortego ĉiam estis dulingva, kaj portugala kaj kastilia, ĉar la portugaliaj reĝoj estis familianoj de la aliaj iberiaj reĝoj⁴.

La temoj de tiu poezia produktado, kiun ofte oni nomas palaca poezio, estas la amo, la satiro kaj kelkfoje la historio.

¹ Portugale: *Cancioneiro Geral*, de Garcia de Resende.

² La Renesanco nur alvenis al Portugalio ĉirkaŭ 150 jaroj post sia komenco en Italio.

³ Fama epizodo de la portugalia historio pritraktita de Garsio Rezendo, de Antono Ferejro kaj plej majstre de Kamonio en *La Luzidoj*. Ineso estis amatino de la princo Don Petro, kiu poste estiĝis la reĝo Don Petro La Unua. Ŝi estis helpantino de la edzino de l' princo. Don Petro kaj ŝi vivadis profundan amon, kaj ŝi naskis gefilojn de la princo. Pro politikaj kialoj, oni murdis ŝin. Post entroniĝo, Don Petro venĝis ŝin, persekutante la murdistojn, kaptante du el ili, sed la tria eskapis. Li kronis ŝin reĝine post ŝia morto.

⁴ Pri la uzado de la portugala kiel literatura lingvo en la tuta Iberio de la 13-a jc., oni legu en La Karavelo n-ro 1, sur la paĝo 4.



Faksimilo el la verko

GARSIO REZENDO

Garsio Rezendo naskiĝis en Evoro, la ĉefurbo de la portugalia regiono Alenteĝo, verŝajne en 1470. Lia nobela origino malfermis al li la pordojn de la kortego de Don Johano La Dua, en 1490. Unue li estis helpanto de la reĝo, kaj poste estiĝis lia sekretario ĝis la morto de Don Johano.

Dum la reĝado de Don Manŭelo, li plu laboris en la kortego. En 1498, li akompanis la reĝon renkontiĝi kun la hispanaj reĝoj. En 1514, li apartenis al senditaro, kiu vizitis la papon Leono La Deko. Post du jaroj, li ricevis la titolon de *hidalgo de la reĝa hejmo*. Garsio ankaŭ sekretariis la princon estiĝontan la reĝo Don Johano La Tria. Li emeritiĝis en siajn proprietaĵojn en Alenteĝo, kie li mortis, en Evoro, en 1536.

Garsio Rezendo estas konata kiel verkisto, sed ankaŭ la desegnado kaj la muziko ne eskapis el lia talento. Li postlasis aliajn kvar verkojn kun interesa historia valoro:

Vivo kaj agoj de Don Johano La Dua

Miksaĵoj kaj historiaj diversaĵoj

Prelego de la Tri Magaj Reĝoj

Kurta Memoraĵo pri la Konfeso Ω



Domo de Garsio Rezendo en Evoro.

Sen tiu esplorado kaj kolektado, tiuj poemoj certe estus malaperintaj, kaj nuntempe neniu konus la verkojn de la tiatempa Portugalio.

Tamen, Garsio Rezendo, per tiu laboro, ne intencis nur savi la poemojn el la tempovoro. Li intencis kaj sukcesis persvadi aliajn verki kaj publikigi, ĉefe pri la heroaĵoj de la portugaloj en la maraj malkovroj. Li jam tiam antaŭsentis, ke tia portugalia epoko, plena je aventuroj, malkovroj kaj heroaĵoj, postulis samnivelan verkon, epopeon, kiun li mem konsciis ne kapabli verki, kiel li mem asertas en la *Prologo* de la verko.

Kvankam sen historia fonto por aserti tion, facile oni imagas, ke 24 jaroj post la eldono de la *Ĝenerala Poemaro*, la 15-jaraĝa Ludoviko Vazo Kamonio, dum studis la klasikajn literaturojn, revis pri verkado de la portugala epopeo, sub influo de la ĵusa historio, kaj akceptante la defion lanĉitan de Garsio Rezendo en la fino de la *Prologo* de l' *Ĝenerala Poemaro*. Ne nur la decido verki *La Luzidojn* ricevis la influon de Garsio Rezendo. Ankaŭ kelkaj epizodoj de la portugalia epopeo montras influon de la *Ĝenerala Poemaro*.

La *Prologo* de l' *Ĝenerala Poemaro* ankaŭ havas kroman antropologian intereson, ĉar en ĝi Garsio asertas, ke la portugaloj ne emas verki pri siaj konkeraĵoj, pri siaj venkoj, pri siaj sukcesoj. Tiam Garsio pravis, kaj liaj asertoj daŭre povas esti aplikataj al la nuntempaj portugaloj.

La kompleta traduko de la *Prologo* de l' *Ĝenerala Poemaro*, el la tiama portugala, publikiĝas sekve. Ω

Prologo de l' Ĝenerala Poemaro ⁵

Moŝta kaj Plenpova Princo Nia Sinjoro ⁶!

Tial, ke la natura karaktero de la portugaloj estas tia, ke ni neniam skribas pri niaj faritaĵoj, kvankam ili estas dignaj je vasta postmemorado; do multaj kaj tre grandaj faritaĵoj pri militoj, pri paco kaj virtoj, pri scienco, pri ruzaĵoj kaj delikataĵoj estas forgesotaj.

Se la verkistoj dezirus vere pritrakti la faritaĵojn de Romo kaj Trojo, kaj verki pri ĉiuj aliaj antikvaj kronikoj kaj historioj, ili ne trovus pli grandajn bravaĵojn, nek pli rimarkindajn faritaĵojn, ol tiujn, kiujn oni povus verki pri niaj samlandanoj, jen de la antikvaj tempoj, jen de la nunaj ⁷.

Tiom da regnoj kaj sinjorejoj, urboj, vilaĝoj, kasteloj, tramare kaj tratrete longe kaj longe trairitaj, prenintaj per la forto de l' armiloj! Estis tiom multnombraj la kontraŭuloj kaj tiom malmultaj niaj viroj ⁸, kiuj subtenataj de tiom da laboroj, militoj, malsato kaj sieĝoj, tiel foraj de l' espero esti savotaj, prenintaj per la forto de l' armiloj tiom da partoj de Afriko, regintaj tiom da urboj, vilaĝoj, fortikaĵoj, kaj daŭre en milito senhalte! En Gvineo, estas multaj gravaj reĝoj kaj gravaj sinjoroj niaj vasaloj kaj tributitoj. Tiom da partoj de Etiopio, Arabio, Persio kaj Hindio, kie tiom da maŭraj reĝoj

⁵ La traduko de ĉi tiu teksto de la 16-a jarcento donis kelkan laboron, ĉefe pro la sintakso plena je enormaj frazoj, kiuj nepre devis esti tranĉataj en la traduko al esperanto. Tamen, oni restigis iom de la origina sintakso, por doni al la dokumento la spicon de antikvaĵo. La interpunkcio devis esti tute refarata, ĉar la zamenhofidoj trovus ĝin vere stranga.

⁶ Garsio Rezendo alparolas al la tiama princo kaj poste reĝo Don Johano La Tria.

⁷ La komparo inter la heroaĵoj de la portugaloj kun tiuj de la antikvaj popoloj estis uzata ankaŭ de Kamonio en la komenco de *La Luzidoj*. Ĝi estas klasika maniero reliefigi la valorojn de la kantataj herooj, per komparo kun aliaj agnoskitaj herooj.

⁸ La malmulteco de la portugaloj ĉiam donis diverstipajn problemojn al la lando. Tiam la portugalia imperio enhavis la teritoriojn de Makao, Hindio, Timoro, vastajn teritoriojn en Afriko kaj la grandan Brazilon. Tiel vasta imperio estis regata kaj defendata de popolo, kiu enhavis nur... 1,2 milionon da homoj, laŭ la unua homkalkulado farita de Don Johano La Tria, en 1527.

kaj gentioj, kaj gravaj sinjoroj, estiĝis per la forto niaj subuloj kaj servistoj, nin pagante per altvaloraj oraĵoj kaj tributoj, kaj multaj el tiuj batalis por ni, sub la flago de Kristo, kun niaj kapitanoj, kontraŭ siaj samnaturuloj. Konkero de 4,000 leŭgoj tra la maro, tiamaniere ke nenioj armeoj de Sultano, nek de iu ajn granda reĝo aŭ sinjoro, kuraĝas navigadi pro timo de la niaj. Multaj perdis siajn aferojn, rentojn kaj vivojn, dum ni prenis tiom da regnoj kaj sinjorejoj, gvidante multajn gentojn al la fido al Jesuo Kristo, kaj tiuj ricevis la akvon de la sankta baptismo. Nu, kaj multaj aliaj rimarkindaj estis la faritaĵoj ne priskribeblaj en malmultaj linioj ⁹.

Ĉiuj ĉi tiuj faritaĵoj, kaj multaj aliaj alispecaj, ne estas diskonigataj, kiel ili estus, se gento de alia nacio ilin estus farintaj. La kaŭzo de ĉi tio estas la individua troa memfidemo [de la portugaloj] ¹⁰, kiu ne lasas al ili konfesi, ke la aliulaj faritaĵoj [de siaj samlandanoj] kaj talentoj eble pli grandas ol la liaj ¹¹.

Kaj precize pro tiu kaŭzo, Tre Altranga kaj Plenpova Princo!, multaj distraĵoj kaj delikataĵoj perdiĝis, sen postinformoj pri ili, en kiuj estas la lirika arto, ĉiam tre estimata, kaj per tio Nia Sinjoro estas laŭdata, kiel en la himnoj kaj kantikoj, kantitaj en la Sankta Preĝejo, kiujn oni vidos ĉi tie ¹².

⁹ Kelkaj el tiuj fieroj estas evidente barbaraj al niaj hodiaŭaj okuloj de esperantistoj, sed kelkaj politikistoj ankoraŭ nuntempe fieras pri la samo.

¹⁰ Garsio parolas pri la troa memfido de la portugaloj. La troo konsistas el vanto kaj fiero, kiu perdigas multajn, kaj ofte la propran landon. Alia trajto de la portugaloj estas la konstanta kritikemo al la propra lando kaj ties landanoj. Ŝajnas, ke la tuta popolo sopiras al platona homidealo, kiun nek la portugaloj nek iu ajn popolo kapablas atingi. Kiam portugalo identigas similajn difektojn en la aliaj popoloj, ekhavas lucidan momenton, komprenante ke niaj difektoj eĉ estas malpli gravaj. Kaj tiel, inter la neŭrozo kaj la psikoza, mia povra kaj heroa lando pludivas de antaŭ pli ol 850 jaroj.

¹¹ Mikso de memfido, vanto, fiero kaj envio. En la portugala, oni nomas tion *mesquinhez*. La tekstoj, kiuj aperas inter rektaj krampoj, estas aldonoj de la esperanto-tradukisto, por pli bona kompreno de la teksto, kies interpreto en la mezepoka portugala ne estas senduba.

¹² Mezepoka etoso. La katolika eklezio kaj la religia vivo regas la tutan socion. Plejparto de la portugaliaj reĝoj havis absolutan povon, sed ofte super ili plej ordonis la katolika sistemo, en kiu la Inkvizicio havis la tropovon konatan de ĉiuj.

Tiel, oni konas la historiaĵojn pri multaj imperiestroj, reĝoj kaj memorindaj homoj, kaj per la rakontado kaj per la lirikado ¹³. En la kortegoj de l' grandaj princoj estas tre necesaj la ĝentilaj kaj priamaj lirikaĵoj, surĉevalaj turniroj kaj skeĉoj ¹⁴. Ankaŭ gravas, ke estu ridindigitaj per lirikaĵoj tiuj, kies agoj tion meritas, estantaj ili, tiel, punitaj kaj admonitaj, kiel oni legos en ĉi tiu libro ¹⁵.

Se oni ne povus repreni la perditajn verkojn de niaj foririntoj, kaj tiujn de la nuntempuloj, tiuj grandaj poetoj, kiuj estis disigitaj, ne famiĝus tiom kiom nun.

Sinjoro, pri **la aliaj grandaj aferoj** ¹⁶, ilia grandeco kaj mia mallerteco ne permesas al mi ilin tuŝi ¹⁷. Sed, pri ĉi tiuj aferoj, pli malgrandaj, mi satigas mian malnovan deziron fari por Via Moŝta Persono ion, kiu amuzu kaj distru vin. Tial, mi arigis kelkajn pasintajn kaj nuntempajn verkojn kaj ordigis ilin en ĉi tiun libron. Pli grave ol montri ilin, estas, ke la plej sciantaj viglu kaj ekverku, kondukante en la postmemoron la aliajn grandajn faritaĵojn, pri kiuj mi ne dignas uzi mian plumon ¹⁸. Ω

¹³ La mezepoka portugala esprimo de la origina teksto estas *rimance e trovas*.

La iberia *rimance*, *xácara* aŭ *solau* estas simila al la eŭropa balado. Temas pri kantata rakontada poemo, kiu disvastiĝas parole, kaj kelkfoje estis skribata. En ĉi tiu tekstero, kio gravas ne estas la ĝenra precizigo, sed la dikotomio inter rakonta ĝenro kaj lirika ĝenro, laŭ la klasika modelo.

¹⁴ En diversaj teksteroj vidiĝas la psikologia kaj socia zorgoj de Garsio Rezendo, homo kies funkcioj en la kortego ne estis nur la amuzaj, sed ankaŭ politikaj, administraj kaj militaj.

Skeĉoj estas la traduko por la portugala *momos*. En ĉi tiu teksto, mi preferis ĝeneralajn vortojn tuj kompreneblajn de la esperanta leganto. Por pli profunda literatura kompreno de la teksto, kie aperas mencioj de diversaj literaturaj subĝenroj, la leganto devas preni la originaĵon, malfacile anstataŭigeblan de iu ajn traduko, eĉ se tre bona. Tio estas valida por ĉiu ajn literatura teksto.

¹⁵ La edukiva rolo de la literaturo trapasas la tutan *Prologon*. La ideo, ke la ĉefa rolo de esperanto estas partopreni en la kreado de pli bona mondo, finfine enkadriĝas en la edukiva rolo de la literaturo kaj ĝenerale de la arto.

¹⁶ Aludo al epopeo. Teksto-nigrigo de la tradukisto.

¹⁷ Modesta teniĝo de Garsio, kiu konsciis pri siaj limoj.

¹⁸ Incito al la verkado de epopeo samvalora kiel la portugaliaj faritaĵoj, inter kiuj la maraj malkovroj.



Evoro

Sude de Lisbono, la plej granda portugalia regiono, Alenteço, etendiĝas ebena kaj trankvila. En ĝi la tempo haltas, la konversacioj longiĝas, kaj la siesto nepras pro la altaj someraj temperaturoj. Ĉi tie la portugala lingvo treniĝas en senhastaj buŝoj, kiuj lante ¹ gustumas apetitigajn vinojn, ravajn fromaĝojn, plejbongustajn porkaĵojn kaj mirindan panon. Ĝia ĉefurbo estas Evoro, kie naskiĝis Garcia de Resende, kaj ankaŭ la dua plej olda portugalia universitato en 1537. 50km nordoriente de Evoro, en Estremozo, eldoniĝas La Karavelo. Ω

tekstoj kaj fotoj de João José Santos



Ĝardeno.



La romiana templo "Templo de Diana".



Unu el la universitataj konstruaĵoj.



Angulo de la evora domaro.



La centro de Evoro, "Praça do Giraldo".



Monakinejo.



Ĉefpreĝejo de Evoro.



Tipa urba pejzaĝo en Alenteço. Ĉi tiu en Evoro.



Turisma ĉeval-ĉaro.

www.esperantopt.com

¹ malrapide (lanta = malrapida)